



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

Abonu nun PP 1978

Pilo-Press  
jara abono  
30,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:  
Ludwig Pöckel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 4/78 - 27 jan 1978  
Aperas ĉiusemajne

### Radio Moskvo disaŭdigos en Esperanto

Nürnberg (pp) - Centra Laborrondo Esperanto, DDR-108 Berlin, informas:  
Sevetuniaj samideanoj petis nin informi vin pri jeno:

Radio Moskvo ekdisaŭdigos en Esperanto.

La unuaj provaj disaŭdigoj estos

- 1) La 4-an de februaro 1978 (sabate), en la kadro de la itallingva unuhora programo: 18,30 - 19,30 (MET). Esperanto aperos ĉirkaŭ la 19-a horo. Kurtondoj: 41 m, 49 m (7320, 7330, 6140 mhc)
- 2) Ripeto samtage 20,30 - 21,30 h (MET) Kurtondoj: 41 m, 49 m (7200, 7320, 7330; 6140 mhc) Mezonodo: 194 m (1540 mhc)
- 3) La 5-an de februaro 1978 (dimanĉe), 19,30 - 20,00 h (MET). Esperanto ĉirkaŭ 19,45 h. Ondo kiel sub 2.

Daŭrigo de la dissendoj dependas de la reeĥo.

Aŭskultu kaj skribu do tuj, en Esperanto, al Radio Moskvo, itala fako, S-ro V.K. Švecov, SU-113 035 Moskvo, Pjytņickaja 25, USSR.

\*\*\*\*\*

### Letero de Radio Moskvo

Pri la sama temo S-ano Henri Masson, Courbevois, Francio, sub la dato de la 9-a de januaro 1978, ricevis leteron de Radio Moskvo, kies tradukon disponigis al ni s-ano Masson kaj ĉi sekve publikigas:

"Ni supozas, ke en la respondo, kiun vi ricevis, nia kolego esprimis sian propran opinion pri Esperanto, opinion pri kiu oni malfacile povas konsenti.

En nia lando la intereso pri Esperanto datiĝas de longa tempo. En 1921 kreiĝis Esperantista Unuiĝo en Rusio. En 1926 Lunaĉarski, popolkomisaro pri instruado, salutis internacian kongreson de esperantistaj laboristoj en Leningrado.

Komisiono pri Esperanto funkcias nuntempe kun la unuiĝo de la sovetaj asocio por amikeco. Tiu komisiono prizorgas diversajn aktivajojn. Ĝi partoprenas en la Internacia Movado "Esperantistoj por la Paco"; ĝi eldonas la revuon "Paco" kaj artikolaron "Nome de Paco"; ĝi organizas renkontiĝojn kaj internaciajn forumojn diverstemajn.

La intereso pri Esperanto kiel helplingvo aparte kreskis lasttempe. Tio estas tute komprenebla, kaj ni konsentas entute kun vi pri tio. La esploristoj de la Instituto pri Lingvistiko de la Akademio de Sciencoj de U.S.S.R. dediĉis al Esperanto plurajn sciencajn verkojn. Ekzemple, S-ro Isaev verkis interesan libron titolitan "Problemoj pri artefarita helplingvo en la epoko de la revolucio scienc-teĥnika".

Pli ol 10 mil Sovetianoj pasiĝas por Esperanto. Ŝoni nombras kvardekon da romanoj kaj multajn poeziaĵojn kaj amatorajn teatrojn de esperantistoj. La entuziasmoj pri Esperanto havas grandan laboron farotan antaŭvide al la Olimpiaj Ludoj de 1980 en Moskvo. Ili partoprenos en la eldono de vortaro de komunaj esprimoj en la franca, angla, Esperanto kaj rusa.

Antaŭ ol konkludi nian leteron, ni invitas vin ĉe la ondoj la 4-an de februaro 1978 je la 18,30 kaj 20,30 GMT por aŭskulti programon en Esperanto, realigitan de la aktivuloj de la Komisiono por Esperanto de la Unuiĝo de Sovetaj Asocioj por Amikeco, distinitan al vi kaj aliaj aŭskultantoj, kiuj interesigas pri tiu problemo."

\*\*\*\*\*

### Noto de Pilo-Press

En la supra letero de Radio Moskvo la redakcio parolas pri la Salutvorto de s-ro Lunaĉarski, la popolkomisaro pri instruado. Temis pri la VI-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Leningrado, de la 6-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1926.

S-ro Lunaĉarski adresis al la SAT-kongreso jenan salutvorton:

"Mi devas konfesi, ke mi mem ne parolas esperanton kaj ne sufiĉe konas la bazojn de tiu ĉi lingvo. En mi ankoraŭ vivas kelkaj aprioraj konsideroj pri tio ke dubinde per vojo de artefarita lingvo oni povas krei tiun unikan lingvon de l' internacia komunikado, kiun celas esperanto. Tiu ĉi movado vastiĝas kun nerefutebla potenco kaj transformiĝas je unu el la plej seriozaj fenomenoj de la moderna socia vivo. Oni ne povas ankaŭ nei, ke la adeptoj de esperanto, konsiante sin konduktoroj de la ekstreme progresivaj formoj de la homa interkomunikado, sentas certan proksimecon al la granda komunista movado kaj ke inter la komunistoj iufoje tutaj organizaĵoj aliĝas al la movado esperantista.

Mi tutanime deziras al esperanto pluan pliproksimiĝon kun la avangardaj formoj de la batalo laborista kaj pluajn sukcesojn.

29.VII.1926

A. Lunaĉarski."

(El Sennaciulo, Ekstra Numero, Novembro 1926)

Ĉetere, Lunaĉarski estis la honorprotektanto de la SAT-kongreso.

\*\*\*\*\*

### Internacia Lingvo - Internacia Edukado

Rotterdam (pp) - Laŭ la Oficiala Komunikado, n-ro 3, la temo de la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en Varna estos "Internacia lingvo - Internacia Edukado". Ĝin parte inspiras la Rekomendo pri Edukado de UNESKO, kiu eliris kune kun la decembra numero de la revuo Esperanto. Kongresanoj povos kontribui siajn ideojn al la Kongreso pri apartaj facetoj de tiu temo dum diskutrondoj: diversaj formoj de Esperanto-lernado (memlernado, studrondoj, korespondaj kursoj); kiel Esperanto povas kontribui al plenumo de la Uneska Rekomendo; la problemoj de komencantoj en la Esperanto-parolanta komunumo; lernado de Esperanto ĉe pensiuloj; kaj la eblecoj kleriĝi kadre de Esperanto-lernado.

Krome ni citas el la Komunikado: Kantistoj, aktoroj, deklamistoj kaj aliaj artistoj de la viva prezento skribu pri siaj talentoj al la membro de la LKK respondeca pri artaj aranĝoj, s-ro Kiril Draĵev, per la adreso de Loka Kongresa Komitato, Bul. Āristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgario.

La Unua Bulteno de la 63-a UK estas denove havebla. La Dua Bulteno kun ĉiuj informoj eliros en marto.

De la 17-a ĝis la 22-a de julio okazos la unua Latinamerika Esperanto-Kongreso en Marilia, Brazilo. Jam oficiale aliĝis al tiu kongreso la landaj movadoj de Argentino, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Ekvadoro, Kolombio, Peruo, Urugvajo kaj Venezuelo.

De Nord-Ameriko kaj Eŭropo estos karavanoj al la Latinamerika Kongreso kiuj poste iros al Varno por la 63-a UK. Tiuj, kiujn interesas la ebleco antaŭfrandi la landon de la 66-a UK (Brazilo, 1981), skribu por detaloj al Flying Dutchmen Travel, Esperanto-Pako, 951 Front St., Novato CA 94947 Usono.

## Pri Luksemburga Esperanto-Centro

### Raporto de d-ro Kondor (daŭrigo)

S-ro Kindler-Triksini estas ofte survoje por prelegi en diversaj urboj pri Esperanto (Weinheim, Koblenz, Ulm, Oberkirch, Oppenau, Konstanz kaj en Luksemburgo mem jam plurfoje!) Li havas bonan kontakton kun la ĉefo de Radio Luksemburgo, Luxair, direktoro de Amnesty International, Holyday Inn, gravaj presejoj, Thomas-Mann-biblioteko (pli frue Goethe-Instituto en Luksemburgo).

La Turisma Oficejo de Luksemburgo eldonis belan prospekton en Esperanto sub la devizo: Malkovru Luksemburgon, la verdan koron de Eŭropo. Tiun ĉi prospekton nepre petu tiuj gesamideanoj, kiuj volas viziti la sekvontan IKUE-kongreson tie, sed ankaŭ tiuj, kiuj entute ŝatus detalajn informojn ricevi en pura Esperanto pri la vidindaĵoj de la belega eŭropa urbo. Adreso: Turisma Oficejo, Luksemburgo.

La redaktoro de la Juna Eŭropano (Der Junge Europäer) telefone petis de Triksini, ĵus ĉe la tagmanĝo, artikolon pri Esperanto por sia gazeto! Ankaŭ la organizantoj de la Katolika Tago en Freiburg petis telefone Triksini-n por partopreni en la Kunveno de Katolikoj septembre kaj aktive riĉigi ĝian programon per prezentado resp. parolado pri Esperanto.

La teksto kaj bildo por la nova afiŝo pri la sekva IKUE-kongreso en Luksemburgo en aŭgusto 1979 jam estas pretaj; baldaŭ oni povos mendi ilin kaj ĝustatempe elpendigi en la koncernaĵoj por propagandi la 38-an IKUE-kongreson! La bildetoj pri la Madono de Luksemburgo, kiun la Luksemburganoj nomas "Dipatrino, la konsolantino de la afliktitoj" jam nun estas haveblaj en la Esperanto-Centro Luksemburgo. Ĉiu bildeto havas la du gravajn katolikajn preĝojn en Esperanto, nome la "Patro Nia"-n kaj la Angelan Saluton, kaj la Magnifikaton (jubilkanton de Maria).

Fino sekvos!

\*\*\*\*\*

### Denove pri Radio Moskvo

Nürnberg/Varsovio (pp) - Dum la tajpado de PILO-PRESS nin atingas ekspresletero el Varsovio de Jerzy Uśpieński, en kiu li ankaŭ nin informas pri la Esperanto-elsendoj de Radio Moskvo, pri kiuj ni raportas sur paĝo 1.

Pri la signifo de la elsendo li skribas: "Ne necesas emfazi por vi la gravecon de la evento! Eĉ se iu ne aŭskultis, li/ŝi skribu! Oni bedaŭru la maleblon aŭskulti kaj postulu ripeton de la elsendo kaj enkonduko de konstantaj Esperanto-elsendoj. Tre gravas kvanto de reeĝoj el ne-socialismaj ŝtatoj."

Pri Pilo-Press Jerzy Uśpieński i.a. skribas: "Plej grava avantaĝo de Pilo-Press estas la varieco, ĉiam novaj aliroj al la demandoj. Estas tre bone, ke vi lerte envicigas ankaŭ la politikajn demandojn. Via PP havas do rolon eble ne tre rimarkatan, sed ege gravan - ili e d u k a s la esperantistojn!"

### Nova aperaĵo por germanlingvanoj

Esperanto in der Praxis, kunmetita de Herbert März sub redakcĉa kunlaboro de Helmut Illetschko; la skizojn faris Herta März.

Formato 9,6 x 20,8 cm, broŝ., 51 p., prezo 30 aŭstraj ŝil. aŭ 4,60 GM

La unua parto, p. 5-22, entenas frazaron en germana lingvo kaj Esperanto pri ĉiutagaj aferoj, la dua parto p. 23-34 enhavas la Esperanto-gramatikon, la tria parto fine havas vortaron Esperantan-germanan p. 35-47. Resume, la libreto estas bonvena por vojaĝado, por komencantoj kaj progresintoj.

Mendu ĉe: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg aŭ ĉe Aŭstria Esperanto-Movado, Hofburg, Postf. 156, A-1014 Wien

## La komentario

La aŭstria semajna komentario de d-ro Alfred Macher, ORF-elsendoj Vieno, tekstas:

"Antaŭ nur du jaroj komencis la protestoj kontraŭ la atomenergiero, kiuj sufiĉe multnombro jam delonge funkciadis en diversaj eŭropaj landoj, ankaŭ en tiuj al ni senpere najbaraj.

Kaj nun bruas ĉe ni internpolitika disputo pri la ekfunkciigo de nia unua atomenergiero. La socialista registaro deziras la konsenton de la opozicio, memorante la elektan fiaskon de la svedaj socialistoj pri grandparte la sama problemo, kaj ĉar en la publika opinio superregas, dank' al klerigaj kampanjoj, sinteno malfavoranta la atomenergion.

Kvankam la konstruado de la atomenergiero Zwentendorf, kvardek (40) kilometrojn okcidente de Vieno, estis komencata siatempe sub ankoraŭ popolpartia reĝimo, tiu sama popolpartio nun kontraŭas la ekfunkciigon, postulante, ke antaŭe estu solvita la problemo, kiel oni forigu en nia lando la tiom danĝeran atom-rubaĵon - ŝajne tre racia postulo.

Sed pasos jaroj ĝis kiam necesos forigi la unuajn eluzitajn piloĵojn, kaj intertempe ni tre probable trovos taŭgajn forĵetejojn, kiel oni trovis tiajn en ĉiuj aliaj landoj.

Kaj ni konsideru, ke en la alproksimiĝantaj ekdekaj jaroj nia ekonomio apenaŭ povos pluprospere en atomenergio!

Certe, do, oni ankoraŭ tre multe diskutos ĉi tiun aferon. "

## Televid-elsendo el Munkeno

Kelkajn minutojn antaŭ la 18-a horo, kadre de "Drehscheibe", la Dua Germana Televido (ZDF), lunde la 23-an de januaro 1978, elsendis mallongan informon kun bildoj pri la inaŭguro de la 1-a Esperanto-gastejo en Bavario, pri kio ni jam raportis en la pasinta numero. Entute, ĝi estis bona elsendo, en kiu oni nur raportis pri faktoj. Oni vidis kelkajn konatajn Esperanto-agantojn de Munĉeno, Augsburg kaj aliaj bavariaj urboj.

## Esperanto en Radio

Radio Roma bedaŭrinde ne estis aŭdebla ĉi tie en Nurnberg.

Radio Vatikana raportis en la informoj, ke la papo donis aŭdiencon, en kiu li parolis pri homaj rajtoj. Oni parolis pri eklezia jarlibro kaj pri nova eklezia provinco en Slovakio.

Radio Varsovio. Esperanto-Ekspreso, Aŭskultantoj por Aŭskultantoj kaj Leterkesto, jen la tri Esperanto-temaj programoj, kiujn ni aŭskultis dum la pasintaj semajnoj. Mankis do aliaj Esperanto-temaj programoj, ankaŭ "Trarigardon de la Esperanto-gazetaro" ni ne aŭdis dum la lasta monato. Ĉu ni preteraŭdis aŭ ĉu oni ne sendis. En la pasinta Esperanto-Ekspreso ni bone aŭskultis la intervjuon, kiun A. Pettyn faris kun d-ro W. Bormann, verŝajne en Rotterdama. Sed ĉu d-ro Bormann vere tuŝis ĉiujn aktivecojn kaj agadojn de germanaj agantoj, kiuj sin okupas pri informado? La intervjuo, laŭ ni, estis iomete magra.

Radio Varsovio anoncas jenan novan konkurson. Oni respondu almenaŭ al unu el la tri demandoj:

- 1) Kiel vi aprezas la ŝancojn de la pollanda futbalista teamo dum la plej proksima mondĉampionado?
- 2) Nomu teamojn, kiuj en la daŭro de la mondĉampionado en Argentino okupos la medalajn lokojn? Motivu vian opinion.
- 3) Kiujn polajn sportajn atingaĵojn vi opinias la plej gravaj kaj kial?

Respondojn oni atendas ĝis la 31.3.78. Adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.